

○●○●○●○●○●○●○●○●○

Go-Amiko

**Informilo de
Japana Esperantista Go-Asocio
N-ro 153, Aŭgusto 2018**

○●○●○●○●○●○●○●○●○

Dum la UK en Lisbono ni propagandis Go-ludon



La 103a UK okazis en Lisbono, Portugalio, inter la 28a de julio kaj la 4a de aŭgusto 2018. Okazis Movada Foiro la 28an, en kiu diverskampaj movadoj sinprezentis.

En la foto s-ro Kimoto el Japanio montras ludmanieron de Go al s-ro Sossois el Belgio.

Dum la kongresaj tagoj ne estis taŭga loko por la ludo, tial ni ne povis plu propagandi la ludon.

リスボンの世界大会の「運動市場」で囲碁の紹介。分科会は持てなかった。

第2回日韓共同大会（第105回日本エスペラント大会）で 囲碁分科会を持ちます

Go-kunsido en la 2a komuna E-Kongreso

2018年10月12日～14日、奈良市で、第2回日韓共同大会が開催されます。そこで、囲碁分科会を持ちます。韓国の棋士も参加します。囲碁を通じて友好を深める良い機会です。また、総会も持ちます。ぜひ皆さんの参加をお待ちしています。

Inter la 12a kaj la 14a de oktobro okazos la dua komuna Esperanto-Kongreso (La 105a Japana Esperanto-Kongreso) en la urbo Nara, kaj ni havos Go-kunsidon. Certe venos koreaj go-ludantoj. Ni atendas vian partoprenon.

囲碁を次の機会に宣伝します

Ni instruas Go-on en jenaj okazoj

1. 春と秋の八ヶ岳エスペラント館の日

(Tagoj de Jacugatake-Esperanto-Domo)

9月15-17日に秋のエス館の日が行われます。希望者があれば堀が指導する予定です。八ヶ岳館には、碁盤が数組おいてあり、いつでも遊べるようになっています。

2. 関西エスペラント大会 (kannsaja Esperanto-Kongreso)

関西エスペラント大会では、森均さんが指導します。

3. 世界エスペラント大会 (UK)

世界大会では、開会式前日の Movada Foiro でいつも宣伝をしています。また期間中も、皆が集まる大きな部屋で随時碁盤を広げて指導しています。

4. 秋の日本エスペラント大会 (Japana Esperanto-Kongreso)

囲碁分科会と総会を開きます

皆さんも、そんな機会に積極的に手助けしてください。

「よんろのご」 “YON-RO NO GO” (GOo sur 4 vojoj)

Citita kaj tradukita el reklamanta interreta paĝo de eldonejo 幻灯社 GENTOU-SYA
<https://www.gentosha-edu.co.jp/book/b341430.html>

「よんろのご」は、プロ棋士の張 栩（ちょう う）九段が考案した、小さな碁盤を使った囲碁のパズルです。タテヨコ4本の路（みち）が通っているので、「よんろ（四路）」といいます。碁盤を大きな木に、碁石を赤と青のりんごに変えて子どもに親しみやすいデザインにしました。

楽しく問題を解いていくうちに、囲碁の「石を取る・つなげる」という基本的なルールをおぼえ、論理的な思考を養うことができます。

“YON-RO NO GO” (GOo sur 4 vojoj) estas GOaj enigmoj sur malgranda GO-tabulo, kiujn elpensis profesiula GOisto 張 栩 {japane ‘TYOU U’/ ĉine ‘ZHANG Xǔ’} 9a DANulo. Sur la tabulo estas strekitaj 4 vojoj, ambaŭ latitudo kaj longitudo. Por amindigi la desegnon al infanoj, tabulo estas montrita kiel arbo, kaj nigraj kaj blankaj ŝtonoj estas montritaj kiel ruĝaj kaj verdaj pomoj.

Lernantoj amuze solvos la enigmojn, dum ili konos bazajn regulojn de la GO-ludo, kapti kontraŭulajn ŝtonojn kaj ligi siajn ŝtonojn, kaj kulturos sian logikan pensmanieron.

+++++



Vidu la foton de la pakaĵo.


Por Goistoj; Vi ludas Ruĝon. Ĉu vi povas venki la ludon?

Kaj Bonvole solvu aliajn GO-problemojn sur 4-voja tabulo, jene...

-Mesaĝo de 張 栩, 9a DANulo profesiula;

“Vi pensus, ke malmutaj estas la varioj sur malgranda 4-voja tabulo, sed implicitaj estas vere diversaj kaj profundaj varioj sur la tabulo kun nur 16 punktoj.

Jene mi prezentas problemojn de diversaj niveloj. Bonvole ĝuu la mondon de profundaj varioj sur 4-voja tabulo.”




Nigro havas metrajton en ĉiuj problemoj.

Problemo 1.

Unue, problemo de fundamenta bon-procedo.


Ataku blankan tranĉeblan punkton kaj “Rekaptu post kaptiĝo”.



Problemo 2.

Iome alteniveliĝas.


Uzu bon-procedon kaj forpereiĝu la blankan ŝtonaron.



Problemo 3.

Ĉi tiu estas problemo de lim-aranĝo.


Nigro ne povas forkapti la blankan ŝtonaron. Sed cerbumu, kiel Nigro venkos la ludon je unu poento da diferenco.



Problemo 4.

Pli altenivela problemo de lim-aranĝo.

Nigro faru alterne-kaptadon, kaj fine venku per mirinda meto!



Problemo 5.

“Kartelo de GO-Sanktulo”

Li skribis jene; “Lasta problemo estas kartelo de mi. Bonvolu trapensu 15 metojn da procedo, inkluzive Blankan rezistadon. Kiu sukcesas trapensi, tiu havas preskaŭ profesiul-niveran forton por trapensi.”

+++++

La ludilaro kaj lernolibro estas eldonita en jaro 2011. Kaj la problemoj estas prezentitaj en IGO Festivalo 2010, TOKIO.

(Tradukita de MORI Hitosi)

Hungario

Prezenti GOon en biblioteko

- Raporteto el retmesaĝoj de Hungara samideano, Hegedűs Imre -

Posttagmeze En 10a de junio, ĉe biblioteko “Méliusz Juhász Péter Könyvtár” nomita memorigante la hungaran verkiston Méliusz Juhász Péter, en granda urbo Debrecen, Hungario, okazis Japana Tago, kiel unu el la pluraj naciaj tagoj. Tiam Hegedűs Imre prezentis GO-ludon al vizitantoj.

+++++

En la biblioteko venis al la go-tabuloj tri lernejanoj kaj unu plenkreskulo. Mi klarigis la bazajn regulojn al unu lernejanino kaj poste mi ludis kun ŝi. Ĉe alia tabulo du gekuzoj estis instruataj kaj poste ili ludis unu kun la alia.



Mia edzino kolektis tradukitajn hajkojn kaj prezentis ilin al interesiĝantoj en alia ejo de la biblioteko.

Mi ne povas skribi multe pri tiuj tri horoj - sed mi povas aldoni kelkajn fotojn.

Sur la unua bildo maldekstre estas mi - dekstre Halász Péter kaj lia edzino.



La dua estis fotita en la fremdlingva fako de la biblioteko.



En la ĉambro de infanoj knabinoj provis japanajn vestojn.



Bedaŭrinde mi ne havas foton pri tio ke la geknaboj ludis - nur pri tio ke ili rigardas mian ludadon...

Mi vidis ludon kie oni devis kapti pilkon per ringo, alian kie oni devis malkonstrui turon per unusola bato... Pri tiuj mi ne vidis fotojn.

JEGA ハケ岳エスペラント館囲碁大会に6人参加

森 5 段が新春囲碁大会に続いて 2 連勝



恒例のハケ岳エスペラント館囲碁大会が下のように開かれ、6人が参加、5局ずつ対局しました。その結果、森 5 段が、新春囲碁大会に続いての 2 連勝を、全勝で飾りました。これで、森さんは 6 段に昇段します。

夜には、桜井さんの指導で、どのように打つかを皆で検討し、考え方を新たにし、棋力も上達しました。

日時： 2019年5月19－20日

場所： ハケ岳エスペラント館

参加者： 桜井信夫8段、木下恒5段、森均5段、堀泰雄4段、二木徹初段、一場肇 4 級

	一場	木下	桜井	二木	堀	森	勝数	順位
一場 4 級		×	×	×	×	×	0	6
木下 5 段	○		×	○	○	×	3	2
桜井 8 段	○	○		○	×	×	3	2
二木 初段	○	×	×		×	×	1	5
堀 4 段	○	×	○	○		×	3	2
森 5 段	○	○	○	○	○		5	1

Okazis la Jacugatake-Go-Konkurso

Ni okazigis Go-konkurson en Jacugatake-Esperanto-Domo kun la partopreno de 6 esperantistoj.

Dato : la 18an kaj la 19an de majo 2018

Loko : Jacugatake-Esperanto-Domo

Rezulto :

Ĉiuj luktis po 5 partiojn, kaj la rezulto estis:

La unua premio : s-ro Mori (5-dana)

La konkursejo estas for de Tokio, do estas iom malfacile kolektiĝi el diversaj lokoj en Japanio, sed sukcese venis 6 esperantistoj kaj ĝue ludis



go-on. S-ro Mori perfekte venkis. Li jam venkis en la januara go-konkurso, do li havis du sinsekvajn triumfojn, kaj tio igos lin 6-dana.

人は様々なゲームで楽しむ2

Homoj ĝuas diversajn ludojn 2

堀泰雄 HORIJasuo

麻雀 Ma ĝango

麻雀は、堀家の毎晩の楽しみだった。戦後、物がないうちに、手先が器用な父は、朴の木で麻雀を手作りした。ちゃんと図柄も入ったものだった。その後、本物の牌を買ったので捨ててしまったのだろうが、もったいないことをした。私が高校時代には、両親と妹と毎晩麻雀をしていたが、勉強もしなければならぬと、1時間きっちり規則で、7時から始めて8時の時報と共に、途中であれ何であれ、それでおしまいにした。

Ludi maĝangon estis ĝuo de la familio HORI. Mia patro, kiu estis lerta manfari diversajn aĵojn, mem faris maĝangon. Poste li aĉetis veran maĝangon kaj forĵetis la manfaritan. Kiam mi estis lernanto en la supera mezlernejo, mi ludis maĝangon kun gepatroj kaj fratino, sed ni devis ankaŭ lerni, do ni havis severan regulon : ni komencis ludi je la 7a horo kaj la ludo finiĝis ĝuste je la 8a, eĉ dum ludado.

大学に入ると、皆麻雀をした。多くは麻雀屋に行き、入り浸っている者もいたが、私はケチで、お金を賭けてやるのが好きではなかったため、その仲間には加わらず、せいぜい下宿で頭数が足りない時だけ、参加した。夏休みに家に帰ってくると、高校時代の仲間と随分麻雀をした。しかし賭けマージャンではなかった。そんなこともあり、私の麻雀は余り強いとは言えず、また、私は役満などという手で上がることが少なく、どうも人間的に大物ではないのかもしれないなどと思った。

Kiam mi eniris en universitaton, multaj amikoj entuziasmiĝis en maĝango, kaj iuj restadis en maĝangejo, ne irante al la klasoj. Mi ne volis veti monon, do mi ne partoprenis en tiu grupo.

Kiam mi revenis hejmen dum feriaj tagoj, mi ludis maĝangon kun miaj eksaj samklasanoj. Ankaŭ tiam ni ne vetis, do mi ne fariĝis forta maĝanga ludanto. En tia okazo mi ne povis venki per speciala rimedo, tial mi pensis, ke al mi mankas tia karaktero, nome mi estas etkapablulo.

麻雀は 4 人いないと成立しない。また夜中まで、時には徹夜ですることもあるので、余裕がないとできない。現在のように、仕事が厳しい時代で、職場の人間関係が難しい時代には、麻雀人口は減っているのだろう。そんなことで、私も、大学卒業以来ほとんど麻雀はしたことが無かったが、最近八ヶ岳エスペラント館で、麻雀グループが出来、年配の女性たちとおしゃべりをしながらするのが、とても楽しみになっている。

Por ludi maĝangon, oni bezonas 4 homojn. Foje oni ludas ĝis meznokte aŭ tranokte, do por tio oni devas havi liberan tempon. En la nuna epoko homoj devas labori longe kaj severe kaj en laborejo homaj rilatoj ne estas tiel amikaj kiel antaŭe, do certe la nombro de maĝangaj ludantoj malgrandiĝis. Mi longe ne ludis maĝangon, sed lastatempe en Jacugatake-Esperanto-Domo ekestis maĝanga grupo, kaj ludi kun esperantistoj estas mia granda ĝojo.



面子が揃うまでにひと練習
(八ヶ岳エスペラント館)
Atendante aliajn du, ili trejnas sin.
(Esperanto-Domo)

次のページの写真は、中国で行われたアジア大会の時に路上で撮ったものである。麻雀の牌は同じようだが、遊び方が全く違う。並べ方も違う。しばらく見ていたが、どのようなルールでやっているのか全く理解ができなかった。

香港に友人がいて、そこでやったこともあるが、その時は牌が2倍くらいの大きさであることを除けば、遊び方には差がなかった。但し、日本のように繊細な役が無く、ホンイツ、チンイツ、トイトイなど、単純なものばかりで面白くなかった。麻雀は大正の

終わりに日本に入ってきたと言うが、日本人はそれを更に面白く作りなおしたということだろう。すべての新しいものは西からやってきて、日本人はそれを更に伝播させる国を東に持たなかったから、輸入された物を改善する習癖になった。麻雀にもそれが見られるのかもしれない。

La suban foton mi fotis, okaze de la 9a Azia Kongreso okazinta en Ĉinio. Maĝangaj kartoĵoj estas samaj, sed ludmaniero estis tute malsama. Longe mi vidis ilin ludi, sed ne povis kompreni, laŭ kia regulo ili ludis.


Mi havas amikon kaj iam mi ludis maĝangon en Honkongo. La kartoĵoj estis duoble grandaj, sed la regulo estis samaj, tamen pli simpla ol en Japanio. Maĝango venis en Japanion antaŭ 100 jaroj el Ĉinio. Ni povas diri, ke japanoj pli evoluigis ĝin. Antaŭ la japana moderniĝo ĉio nova venis de okcidento, sed japanoj ne havas aliajn landojn oriente por transsendi tiujn, tial ili havis kutimon pli bonigi, pli beligi tiujn enportitaĵojn. Tiun kutimon ni povas vidi ankaŭ en maĝango.



Go-ekzercaro por komencantoj (17)



N.Sakurai

Kiel Nigro kaptu la blankajn tri ŝtonojn?




Respondo A: Bona
N-1 estas bona. La blankaj tri ŝtonoj ne povas eskapi.


Respondo B: Daŭrigo
Blanko klopodas eskapi kiel B-1, B-3, sed per N-4 fuŝas.



La problemo 255
Nigro havas meton.
Se vi trovas la unuan meton, la sekvo estas facila.



La problemo 256
Nigro havas meton.
Blanko forlasis la necesan meton. Kiel kulpigi la neglekton?



La solvo 255-a

La blanka ŝtonaro mortas.

Fig. 1-a. (La solvo) N-1 la ŝpruco estas ĝusta. Al la tranĉo B-2 sekvas N-3, B-4, kaj N-5. Blanko ne povas ligi la minacatajn tri ŝtonojn pro la lavango. Ĉe B-2, se B-3, Nigro ligas kiel N-2. Post tio la meto a aŭ 4 estas unu el la du.

Fig. 2-a. (Malsukceso) La ŝpruco N-1 malsukcesas. Blanko respondas ĉe la esenca punkto B-2 kaj vivas.




fig. 1-a.




fig. 2-a.

La solvo 256-a

La blanka ŝtonaro mortas.

Fig. 1-a. (La solvo) La ŝpruco N-1 estas la solvo.

Fig. 2-a. (Daŭrigo) Al B-2, denove la ŝpruco N-3, kaj tiam mankas al la blanka ŝtonaro vivspaco. Go-maksimo diras, "La ŝpruco portas la morton."




fig. 1-a.




fig. 2-a.

Fig. 3-a. (Malsukceso) La eniro N-1 estas senutila. Al N-3 ŝpruco Blanko ligas oblikven kiel 4, kaj post N-5, B-6 la punktoj 7 kaj 8 estas unu el la du.

Fig. 4-a. (Vario: Forĵeti negravajn tri ŝtonojn) Ĉe N-5 de Fig. 3-a, se N-5, sekvas ĝis B-12 (=B-8). Post B-12, Nigro kaptas la tri blankajn ŝtonojn, sed Blanko povas tuj rekapti la kaptintan nigran ŝtonon, kaj tiel la blanka ŝtonaro vivas kun du okuloj.




fig. 3-a.




fig. 4-a.

Fig. 5-a. (Malsukceso) Al la ĉirkaŭtuŝmeto N-1 sekvas rekte ĝis B-8, kaj la blanka vivas senkondiĉe.

Fig. 6-a. (Vario) Al N-1, se Blanko premas kiel B-2, sekvas N-3, kaj la blanka ŝtonaro mortas. Sed se Nigro senatente tranĉas kiel N-a kontraŭ B-2, Blanko havas ŝancon konduki al la alternekapto.




fig. 5-a.




fig. 6-a.

Proponota Agadplano de JEGA

Dum la 105a Japana Esperanto-Kongreso ni havos kunsidon kaj ni proponos jene nian agadplanon:

1. Estraro

Reprezentanto: HORI Jasuo (s-ro)

Sekretario: MORI Hitoŝi (s-ro)

Kasisto; SAKURAI Nobuo (s-ro, Honora Reprezentanto)

2. Agadplano

(1) Kunsidoj

Novjara kunsido : 2019.1.14 en la Go-salono de s-ro Sakurai

Maja kunsido : 2019.5.18-19 en Esperanto-Domo de Jacugatake

La 104a UK : en Movada Foiro kaj en salono ni gvidos go-kurson.

La 106a Japana Esperanto-Kongreso: ni havos kunsidon.

(2) Eldono de Go-amiko

En aprilo, aŭgusto kaj decembro ni eldonas nian revuon.

Go-amiko aperos en nia retejo: <http://jega.shisyou.com/jega/index.html>

(3) Kotizo de JEGA

Japanaj membroj pagu 1000 enojn kiel la jaran kotizon. Se eblas, donacu 1500 enojn pli.

Eksterlandaj abonantoj ricevos la revuon senpage.

*Se ili volas subteni la agadon de EGLI, ili membriĝu al EGLI, pagante la jaran kotizon de 10 eŭroj al UEA-konto de EGLI.

(4) Libroj kaj go-tabuloj

Ni havas relative grandan stokon de go-libroj kaj tabuloj.

* "Invito al GO-Ludo" (maldika libro): ni senpage donacos.

* "Fundamento de Taktiko kaj Strategio de GO-Ludo" (dika libro) kun pago.

* Go-tabulo (9x9-linia) kaj ŝtonaroj: ni senpage donacos.

Kio estas JEGA?

Japana Esperantista Go-Asocio naskiĝis en la jaro 1979 kiel organizo de japanaj esperantistaj go-amantoj kaj subtenanto de Esperantista Go-Ligo Internacia, kiu celas disvastigi go-on per Esperanto kaj Esperanton per go-o.

Ek de la fondo de la asocio nia organo "Go-Amiko" estis eldonita jare kvarfoje, sed ekde 2015 trifoje, kaj ĝi daŭras ĝis nun, kalkulante numeron pli ol 150-an.

Unu el la fondinto de la asocio, kaj dum la frua periodo la direktoro, Minosuke EMORI elverkis kaj eldonis gvidlibrojn de Go-o en Esperanto "Invito al Go-Ludo" kaj "Fundamento de Taktiko kaj Strategio en Go-Ludo" por disvastigi go-on tra la tutmonda esperantistaro.

La membronombro de la asocio kalkuliĝas ĉirkaŭ 40 konstante. La agado de la asocio estas okazigo de novjara go-kunveno kaj de go-kunloĝado en Esperanto-Domo de Jacugatake.

JEGA とは 日本エスペランチスト囲碁協会は 1997 年に発足。創立以来 Go-amiko を季刊で発行、現在 152 号になっている。会員は 40 人、新春囲碁大会と八ヶ岳エスペラント館での合宿を定例の行事にしている。出版物には Invito al Go-Ludo (囲碁への招待) と Fundamento de Taktiko kaj Strategio en Go-Ludo (囲碁の戦術・戦略の基本) がある。

○—●—○—●—○—●—○—●—○—●—○—●—○—●—○—●—○—●—○—●—○—●—○—

Japana Esperantista Go-Asocio (JEGA) 日本エスペランチスト囲碁協会
Esperantista Go-Ligo Internacia (EGLI) 世界エスペランチスト囲碁協会
UEA-konto: egli-f

Retejo: <http://jega.shisyuu.com/jega/index.html>

Adreso: 2-13-3 Ootone, Maebaŝi, Gunma, Japanio, 371-0825, Japanio
Ĉe HORI Jasuo

371-0825 群馬県前橋市大和根町2-13-3 堀泰雄方

retadreso: horizonto@water.sannet.ne.jp 電話:027-253-2524